

Rainer Maria Rilke,

Aŭtuno

tradukita de Cezar

Folioj falas iel el la for',
 jen kvazaŭ velkus en ĉiel' ĝardenoj.
 Faladas ili kun neanta gesto.
 Kaj nokte sinkas peza ter' sen resto
 el ĉiuj steloj al solec' en hor'.

Ni ĉiuj falas. Jen ĉi man' dum fal'.
 Aliajn vidu, samas ja ĉe ĉiu.
 Kaj tamen estas iu, tenas tiu
 tenere ĉion softe dum la fal'.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de RAINER MARIA RILKE (Rajnero Mario Rilko, *1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de CEZAR (civila nomo: Hans-Georg Kaiser, *1954-05-21).*

Arg-773-2256 (2015-01-22 12:16:31)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.ipernity.com/blog/cezar/605953>.

Rainer Maria Rilke,

Aŭtuno

tradukita de Manfred Retzlaff

Folioj kvazaŭ el la malproksim'
 - ĉu velkas enĉiele jen ĝardenoj? -
 faladas kun gestad' neanta;
 la peza Tero estas subiĝanta
 en la solecon el stelar-senlim'.

Ne estas en la mondo viv' sen fin'.
 Ja falas ĉiu mano. Tamen sciu,
 ke regas super ĉio Iu, kiu
 en Sia man' mildege tenas nin.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de RAINER MARIA RILKE (Rajnero Mario Rilko, *1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1996-09-26.*

MR-287-1 / Arg-773-1550 (2014-11-06 13:16:30)